
AVENO 39 Junio 2014



Karaj geamikoj,
jen tute konciza AVENO – sen la detalaj informoj pri ekologio, ekonomio, Homaj kaj Bestaj Rajtoj, kaj unuopaj verdaj partioj. Bonvolu legi tion sur: **www.verduloj.org/aveno.htm**

La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Civil-socia Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en Ne-Registaraj Organizaĵoj pri la avantaĝoj de Esperanto kaj reciproke. Ni pensas tutmonde & agas surloke kaj regione. La bazo de nia sukceso: via kunlaboro.

**Renkontighoj de AVE:**

2014-06-07 (Sabato) AVE-anoj kunvenos en Erfurt okaze de la Germana Esperanto Kongreso. Dum publika kunveno ni informis pri AVE kaj la afrikaj projektoj en Tanzanio kaj D.R. Kongo.

2014-07-11 Fest-kunveno "30 Jaroj de AVE" okaze de la EEU-Kongreso en Rijeka.

2014-07 UK en Buenos Aires - Agendo 21 & Dauropovo en la Esperanto-Movado. (sen AVE)
2014-08-09/16 SAT-Kongreso en Dinan, AVE partoprenas en la Ekologiisma Frakcio de SAT

**Historio de AVE:** AVE estis fondita 1984 en Liège (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj. Pli sur nia retejo kaj en AVENO 34.

**Agado:** Ĉar AVE vivas de la ligo inter la membroj, ni ŝatas ricevi de vi informojn, rilate al verda politiko en via lando por publikigi ilin en **Aveno**, nia reta bulteno. Nia diskutlisto Verduloj: ipernity.com/group/227876

Ni subtenas evoluajn projektojn de esperantistoj: **Mazingira** (nord-okcidenta Tanzanio) de Mramba Simba en Salama & Ketare: Agadoj: trinkakvo, biogaso, re-arbarigo, kuiri ligno-shpareme, mikrokreditoj, radio-stacio, sunflora oleo. Orfoj: daura subteno de orfoj (ch. 300 el 800) pagante lernejokotizon 30 Euro. Konstruado de dua mez-lernejo „Esperanto Secondary School", kie helpis esperantistoj mane kaj finance, ghi nun havas 6 klasejojn por 240 lernantoj.
**Bonvolu subteni la projekton Mazingira** ghirante al: IBAN: BE66 0000 2653 3843; BIC: BPOTBEB1 de la Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, menciu: Mazingira, temo & via nomo
**Adreso: Mazingira** Community, c/o Mramba Simba Nyamkinda, P.O.Box 51, BUNDA, Tansania.
retejoj: www.verduloj.org/afriko.htm kaj (de,en,eo,fr,nl) www.kono.be/mazingira/

**PIEADC** en Kalima, D.R. Kongo, tie Etienne Katchelewa (ekkn-y) organizis por reaktivigi agro- kaj fish-kulturadon, kaj aadas por solubra trinkakvo: www.kamparanasolidareco.weebly.com
AVE organzis por la akvo-projektoj 3 kaj 5 mil Eurojn en 2013 kaj 2014, respektive. 2014 ni bezonas 10 mil, AVE klopodas trovi la aliajn 5 mil > nia UEA-konto.
**Pli pri ambau projektoj: verduloj.org/afriko.htm**

Por la **Verda Movado** ni informas kaj tradukas:
Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj, 2012 (Dakar), http://www.globalgreens.org/globalcharter
Civila Krizo- kaj Konflikt-Solvado (2 p.),
Ĝenerala Konvencio pri la Komerco en la Servoj (2 p.)
Programo de la Europa Verda Partio, 2006; Manifesto de 2009 kaj nun 2014 (tradukata)
Verdula Libro, Verda/EFA EP-Frakcio,2004-2009
100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio
Plastajhoj en la akvaroj & kemiajhoj en la plastajhoj.
retaj konsiloj pri Efika Uzado de Energio; Dauropova uzado de fekunda grundo; k.a.

**AVE kunlaboras kun:**
**Verdaj Partioj** surloke, regione, tutmonde:
Francio: lesverts.fr/article.php3?id_article=645
(de) gruene-jugend.de/nachrichten/98888.html
(eo) gruene-jugend.de/aktuelles/111036.html
Verda Europa Fonduso lanchis sub-pagharon "en aliaj lingvoj". GEF (Green European Foundation) vidis, ke la angla ne sufichas: (en, aliaj) www.gef.eu

**Esperanto-Movado:** SAT, UEA, TEVA, EEU
eeu@europo.eu , .europo.eu/en/chefpagho
Cultura 21: Internacia retejo kiu traktas la kunligitajn temojn dauripoveco, tutmondigho, kulturo kaj arto. www.cultura21.net/eo/esperanto-eo

**UEA:** rilate AGENDOn 21**:** AVE ekde 1998 proponadas amendon de la UEA-Statutoj per la temo "daurigeblo" - lau la Pinto-Kongreso pri la tutmonda naturmedio en Rio 1992, Rio+20. gravaj terminoj:
(en) resilience = rezistopovo
(en) sustainablity = daurigeblo, dauropovov(ec)o
(en) subsidiarity = laueble loka memzorgo
(en) serendipity=prudente akcepti hazardajn informojn

Por **membrighi** al AVE vi ne bezonas esti membro de iu Verda Partio, sed vi devus akcepti niajn "Celojn", AVE havas ch. 340 membroj. Bonvolu informi nin se vi aktivas (pli aŭ malpli) en iu ajn NRO/CSO aŭ partio por nia statistiko. Bonvolu membriĝi en Verda Partio de via lando: globalgreens.org/federations
**Kontribuoj bonvenaj** pere de artikolo kaj kunlaboro en iu Verda Partio au CSO.
Ni preferas koncizan tekston (rtf): (cx-ux, ch-u)

**Kotizi** al AVE: libervole paginda kotizo: 5+x Euro
**UEA-Konto de AVE:** „avex-z" au al la konto de UEA: ING: BIC/SWIFT: INGBNL2A, IBAN: NL72INGB0000378964. Ne forgesu mencii: ("via nomo" por Konto avex-z)

AVE sekretario:
Manfred Westermayer
Kandelstr. 62
DE-79194 Gundelfingen/Brsg
ave@verduloj.org, www.verduloj.org